



František Alexander Elstner (1902-1974)

Oldřich Arnošt Fischer

Prelego por Esperantista Klubo Brno, filia societo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,
la 6-an de novembro 2019

František Alexander Elstner naskiĝis kiel František Alois Elstner la 11-an de aprilo 1902 en Prago. Li estis unusola filo de komercisto. Ekde la jaro 1913 li sukcese studis en mezlernejo.

En la jaro 1916 li skoltiĝis (sub skolta kromnomo Frank) kaj eklaboris en Mezlernejana Asocio. Li estis bona sportisto kaj ŝatis aventurojn. Tial li en la jaro 1916 foriris en Ukrainion, kie li enkadre de Internacia Ruĝa Kruco helpis en batalo kontraŭ tifa epidemio kaj subnutrado. Bedaŭrinde tien li foriris sen permeso de direktoro, tial li post reveno estis el la mezlernejo ellasita. Helpe de Ministerio de Edukado li povis fini sian mezlernejanstudadon kaj sukcese fari ekzamenon pri matureco en junio 1921.

František studis en jurista kaj filozofia fakultatoj, sed kaŭze de multe da interesoj li siajn universitatajn studadojn neniam sukcesis fini. Li ellernis germanan, anglan, francan kaj hispanan lingvojn, primajstris multe da sportoj, ekzemple kanuistikon, arkpafadon, futbolon, volejbalon, skiadon kaj bokson. Li kontribuis en skoltajn ĵurnalojn, amatore ludis

teatron kaj eĉ verkis scenarion por filmo pri vivo de junularo, en kiu li ludis ĉefan rolon. (Bedaŭrinde la filmo neniam estis finita kaŭze de manko de mono.)

En Parizo li partoprenis en internacia skolta kongreso. Tie li konatiĝis kun Robert Baden-Powel (1857-1941), unu el fondintoj de skolta movado.

Pentristo Ernest Thompson Seton (1860-1946) fondis la movadon Arbara Saĝo (angle: *Woodcraft*), kies celo estis pliboniĝo de kontaktoj de homoj kun naturo.

Robert Baden-Powel estis britia armea oficiro (brigada generalo) kun skoltaj spertoj el Hindio kaj precipe el la dua anglo-bura milito (1899-1902). Komence Seton kaj Baden Powell estis amikoj, sed inter ili estis tiu diferenco, ke Seton akcentis rilaton de homoj al naturo, sed armea oficir (brigada generalo) Baden-Powel volis eduki precipe skoltojn-soldatojn. Ĉeĥoslovakaj skoltoj, ekzemple Miloš František Seifert (1887-1941) inklinis pli multe al koncepto de Seton. (En la 20-aj jaroj en Ĉeĥoslovakio paralele kun skolta movado evoluis trempa movado de homoj, kiuj admiris idealojn de Seton, sed ne volis akcepti striktan disciplinon de skoltoj.)

Kiam la unua skolta renkontiĝo okazis en Prago (junio-julio 1922, Císařský ostrov), profesoro Antonín Benjamin Svojsík (1876-1938), fondinto de ĉeĥoslovaka skolta movado, kontraktis kun britiaj skoltoj, ke du ĉeĥoslovakaj skoltoj (Frank Elstner kaj Ernie Dick) partoprenos en staĝo (*Wood Badge*) en skolta trejnada tendaro en Gillwell apud Chinfeld. Kia la trejnado estis? Vera kanada indiano la skoltojn instruis legi spurojn de bestoj kaj homoj. Lignohakisto skolton instruis labori kun ligno. Maristo ilin instruis pri nodoj. Tial la staĝo en Grandbritio havis por Frank grandegan signifon. Post reveno Frank kun Svojsík laŭ britia modelo en aŭgusto 1923 en Ĉasarbaro Jemčinská apud Jindřichův Hradec aranĝis kurson por 22 skoltaj taĉmentestroj. En la jaroj 1924 kaj 1925 Frank sole instruis skoltojn en Valo Drhlenské apud Mnichovo Hradiště. Mi opinias, ke Jaroslav Foglar (1907-1999) en sia libro *Hoši od Bobří řeky* (La Knaboj de la Kastora Rivero) priskribi skoltan gvidanton kun la kromnomo Rikitan laŭ Frank Elstner.

Post fino de kurzo por mezlernejoj en Ŝtata Bohemia Instruista Instituto (1923-1924) František ekhavis rajton instrui en bazaj lernejoj. Li fariĝis instruisto en baza lernejo de Stará Boleslav.

En la jaro 1925 František edziĝis kun Eva Růžena Tomešová kaj en marto 1926 ilia filo René naskiĝis.

Ekde la jaro 1918 František kontribuis en ĵurnalon *Motor Revue* kaj helpis al fondiĝo de kelkaj motoristaj kluboj (ekz. Ligo de Ĉeĥoslovakaj Motoristoj, *Aero Car Club*). Spite de lia arda intereso pri motorismo, li ne posedis motoran veturilon. Krom tio tiamaj instruistoj havis malgrandajn salajron. Tial redakcio de la ĵurnalo *Motor Revue* al li pruntedonis monon. Feliĉa instruisto František aĉetis anglan motociklon A. J. S. kun flanka ĉareto. Li jam povis vojaĝi en diversajn eŭropajn ŝtatojn.

En la jaro 1927 lia unua libro *Knih o uzlech* (Libro pri Nodoj), estis eldonita.

Ekde la jaro 1929 li povis instrui la disciplinon „Scienco pri Motoroj“ en lernejoj por entreprenantoj.

Lia unua propra aŭtomobilo estis Praga Piccolo, per kiu en aŭgusto 1930 li kun siaj familianoj vojaĝis en Dubrovnik-on.

Ni devas substreki, ke František estis instruisto. Li observis rapidan evoluon de motorismo en Ĉeĥoslovakio kaj sciis, ke precipe infanoj kaj junularo estas oftaj viktimoj

de trafikaj akcidentoj. Tial li ilin instruis, kiel travivi en trafiko. Li bone desegnis, eldonis librojn, prelegis kaj en siajn prelegojn invitis eĉ verajn profesiajn policianojn, kiuj al infanoj montris, kiel homoj devas observi signalojn de semaforo kaj la policianoj.

En la jaro 1932 fabriko Aero al li pruntedonis unucilindran aŭtomobilon Aero 500. František, Eva kaj amiko Vladimír Kavalier veturis al Adriatio (3 353 km). Ilia vojaĝo estis sukcesa, tial František povis fari aliajn ekskursojn kun prunteprenitaj aŭtomobiloj.

Eksterlandaj vojaĝoj de František helpis prezenti kaj vendi ĉeĥoslovakajn aŭtomobilojn eksterlande. Krom tio František raportis al teĥnikistoj kaj konstruktoroj pri difektoj, kiujn li survoje devis ripari. (simile Jiří Baum (1900-1944) Jiří Hanzelka (1920-2003) kaj Miroslav Zikmund (*1919) provis aŭtomobilojn Tatra).

En la jaro 1933 subgvide de pilzena apotekaristo Jaroslav Doubek estis aranĝita ekspedicio en Afrikon. Partoprenantoj de la ekspedio Aerospexor havis tri aŭtomobilojn Aero 18 HP kun ducilindraj motoroj (662 cm²). Ili dum 42 tagoj veturis el Prago trans Italio al maro, vizitis Livion, Tunision, Alĝerion kaj Marokon, revenis trans Hispanio, Francio, Italio kaj Aŭstrio (14 000 km).

En la jaro 1934 laŭ propono de Eliška Junková-Khásová (1900-1994) ekspedicio de kvar aŭtomobiloj Aero 1000 okazis. Blua koloro tiam estis nekutima, ĉar la aŭtomobiloj Aero kutime estadis aŭ ruĝaj aŭ blankaj. Granda senzacio estis partopreno de ses junaj virinoj, kiujn akompanis du viroj Elstner kaj Bohumil Turek (1901-1972). La virinoj ne estis komencantinoj, sed spertaj motoristinoj: Eva Elstnerová, Ela Slavíková, Zdeňka Veselá, Eliška Kavalierová, Věra Vlčková kaj Helga Martenová. La veturado daŭris 48 tagojn. „Blua Teamo“ vizitis Alĝerion kaj Marokon (17 600 km). La ekspedicio estis sukcesa, ĉar ĝi montris bonan kvaliton de ĉeĥoslovakaj aŭtomobiloj, per kiu eĉ virinoj kapablis veturi en danĝera tereno. Por František tio estis tre nefacila vojaĝo, ĉar krome teĥnikaj problemoj li kun helpo de Turek devis solvi ankaŭ kverelojn de ses junaj, temperamentaj virinoj.

Kompare kun tio la veturado en Anglion kaj Skotlandon (1934) estis tre facila.

En la jaro 1936 František kun sia edzino Eva veturis en Nordan Amerikon kaj Meksikion. Ili uzis la aŭtomobilon Škoda Popular en arĝenta koloro. La veturado (25 000 km) daŭris 100 tagojn.

En la jaro 1937 František kaj Eva veturis al rumana bordo de Nigra Maro. Ili uzis la aŭtomobilon Škoda Rapid kaj veturis trans Aŭstrio kaj Jugoslavio en Rumanion. Kiam ili revenis, en Rumanio ili vizitis la urbojn Braŝovo, Sibiu, Kluĵo, Satu Mare kaj en Hungario Debrecenon kaj Budapeŝton.

En la jaro 1938 František, Eva kaj poste František Lhota vizitis Sudan Amerikon, nome Brazilion, Argentinon kaj Urugvajon. Ili uzadis la aŭtomobilon Škoda Popular, sed ankaŭ trajnon, ŝipon kaj aviadilon.

Dum la dua mondmilito František kunlaboris kun komiko Jára Kohout (1904-1994) en lia Teatro U Nováků kaj fama aktoro Rudolf Hrušínký, pli aĝa (1920-1994) al kiu kiel scianto de Meksikio konsilis pri filma komedio *Pancho se žení* (Panĝo edziĝas), sed ambaŭ kunlaboroj estis nesukcesaj.

En la jaro 1945 František estis stiranto de aliancaj politikistoj, kiuj estimis liajn spertojn kaj bonegan scion de lingvoj.

En la jaro 1946 František divorcis. Lia nova partnerino estis pilzena dancistino Jiřina Zemánková, sed ilia edzeco daŭris nur ses semajnoj. En la jaro 1947 František denove edziĝis kun Anna Šedivá.

Post la dua mondmilito František kontinuus siajn ekspediciojn kun sia edzino Anna Elstnerová kaj 21-jara filo René Elstner. Uzante la aŭtomobilon Aero Minor II ili veturis en Afrikon. El Alĝerio ili veturis al Guinea Golfo kaj reen.

František ne povis scii, ke tio estis lia lasta libera veturado. La 25-an de februaro 1948 ĉeĥoslovakaj komunistoj faris sukcesan puĉon kaj ekreĝis por longa 41-jara (1948-1989) epoko de socialismo. Ili ne estimis, ke František jam faris multe por sia patrujo. Ili uzis nek liajn lingvajn spertojn nek liajn eksterlandajn kontaktojn. Homoj kiel fiera skolto kaj elstara vojaĝanto František, kiu ŝatis liberecon kaj amikiĝis kun Baden Powel, estis por socialismo dangeraĵoj.

Nur post 12-jara paŭzo, en la jaro 1959, František povis veturi kun Jan Fiala en Sovetunion. Ilia aŭtomobilo estis Škoda Octavia. Veturado trans Blankruslando (Minsk) en Moskvon devis propagi socialismon. Itinero devis esti aprobita per komunistoj. Elstner devis observi la aprobitan traceon (14 000 km), komunistoj determinis, kien li povas iri, kion li povas kun kiu li povas paroli ktp. Vojaĝantoj vizitis Ukrainion, Krimeon, Kartvelion, Aĝarion kaj Abĥazion, Rumanion (Bukareŝton, Aradon) kaj Hungarion (Debrecenon, Budapeŝton). La libro *Šťastnou cestu, Octavie!* (Feliĉan vojaĝon, Oktavia!) el la jaro 1961, estis eldonita en praga eldonejo *Svět sovětů* (La Mondo de Sovetoj), kiu apartenis al Asocio de Ĉeĥoslovaka-Soveta Amikeco, tial ĝi estas propagado de soveta socialismo.

Veturado en Sovetunion estis lasta eksterlanda vojaĝo de Elstner. Longtempe preparita projekto de veturado en Ĉinion ne estis permesita. Uzante la saman aŭtomobilon František kun sia amiko kaj tri knaboj veturis en socialisma Ĉeĥoslovakio el la montaro Ŝumava en slovakon montaron Tatry.

Libroj de Elstner estis malpermesitaj. Li ne plu povis verki librojn pri siaj vojaĝoj, tial li verkis malgrandajn utilajn libretojn pri tendaradoj, vivo en naturo kaj metioj.

Nur en la jaro 1972 Studio Brno de Ĉeĥoslovaka Televido kreis du filmojn kun F.A. Elstner. La filmoj estis prezentitaj, sed poste ili „hazarde“ malaperis.

František Alexander Elstner forpasis la 8-an de septembro 1974. Li estas entombigita en Prago-Vinohrady.

Rekomendita literaturo

ELSTNER, F.A. 1931: Dopravní výchova československé mládeže. (Prelego). Věstník pedagogický, 13, 1-4.

ELSTNER, F.A. 1946: Evropan se vrací. Dobrodružství, dlouhé 25 000 kilometrů, které prožili dva Evropané v malém voze mezi Prahou a Horou, která kouří. 1-a eld. Prago, Julius Albert, 433 paĝoj.

ELSTNER, F.A. 1947: Benzinové opojení. 1-a eld. Prago, Československý kompas, 213 paĝoj.

ELSTNER, F.A. 1962: Dovedu to! Knížka pro chlapce a děvčata, kterým se líbí pořádek a nový domov. 2-a eld. Prago, Naše vojsko, 229 paĝoj.

ELSTNER, F.A. 1970: Dobrodružnou stezkou. 3-a eld. Prago, Mladá fronta, 344 paĝoj.

- ELSTNER, F.A. 1970: Dovolená pod stanem a s karavanem. Přátelský průvodce pro milovníky modré oblohy, pro turisty, tuláky a světoběžníky, pěší i motorizované. 1-a eld. Prago, Práce, 154 paĝoj.
- ELSTNER, F.A. 1971: Pan Trabant & Bílá slečna aneb Putování s kloboučkem. 1-a eld. Ostrava, Profil, 143 paĝoj.
- ELSTNER, F.A. & ELSTNEROVÁ, A. 1953: Cvičná křižovatka. Scenario výchovného pásma. 1-a eld. Prago, Státní pojišťovna, 20 paĝoj.
- FISCHER, O.A. 2015: Eduard Štorch kaj Antonín Zhoř. Prelego por Esperantista Klubo Brno, la 4-an de novembro 2015. – http://esperantobrna.cz/malnova/fischer_antonin-zhor-kaj-eduard-storch_151104.pdf
- FISCHER, O.A. 2018a: Jiří Baum (1900-1944). Prelego por Esperantista Klubo Brno, la 4-an de aprilo 2018. – http://esperantobrna.cz/malnova/fischer_jiri-baum.pdf
- FISCHER, O.A. 2018b: Zdeněk Matěj Kuděj (1881-1955). Prelego por Esperantista Klubo Brno, la 17-an de oktobro 2018. – http://esperantobrna.cz/malnova/fischer_zdenek-matej-kudej.pdf
- TUČEK, J. 2015: F.A. Elstner, muž činu. 1-a eld. Prago, Grada Publishing, a.s., 142 paĝoj.

Verkoj de F. A. Elstner rete atingeblaj (ĉeĥe ĉe la Urba Biblioteko Praha):

- Benzinové opojení https://web2.mlp.cz/koweb/00/04/45/16/01/benzinove_opojeni.pdf
- Evropan se vrací https://web2.mlp.cz/koweb/00/04/29/97/16/evropan_se_vraci.pdf
- Lovci kilometrů https://web2.mlp.cz/koweb/00/04/35/41/97/lovci_kilometru.pdf
- Na jih od Bengazi https://web2.mlp.cz/koweb/00/04/29/97/17/na_jih_od_bengazi.pdf
- Pan Trabant & bílá slečna https://web2.mlp.cz/koweb/00/04/29/97/13/pan_trabant.pdf
- S kamerou a za volantem třemi díly světa
https://web2.mlp.cz/koweb/00/04/35/41/98/s_kamerou_a_za_volantem_tremi_dily_sveta.pdf
- Saharou a pralesem https://web2.mlp.cz/koweb/00/04/29/97/20/saharou_a_pralesem.pdf
- Šťastnou cestu, Octavie! https://web2.mlp.cz/koweb/00/04/29/97/11/stastnou_cestu_octavie.pdf
- Tango Argentino https://web2.mlp.cz/koweb/00/04/29/97/18/tango_argentino.pdf
- Tři kluci + km https://web2.mlp.cz/koweb/00/04/29/97/10/tri_kluci.pdf
- Vázání uzlů https://web2.mlp.cz/koweb/00/04/46/71/22/vazani_uzlu.pdf
- Věci z jednoho pokoje https://web2.mlp.cz/koweb/00/04/29/97/15/veci_z_jednoho_pokoje.pdf